

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

N-ro 27, 10. Aprilo 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

Rejnlando kaj Vestfaliao.

Kanto de Rejnlandano

Alrapidu, tutmondanoj,
Al la bela Rejna bord':
Vin mirigis de l' rejnanoj
Korgajeco kaj konkord'!
Nur ĉe l' Rejn' mi volas vivi,
Kie — ĝuo por la kor' —
El la montoj iĝas vitoj,
El la vitoj vina or'.

Ke fraŭlinoj fremdaj logu
Min al sude suna ter',
Kie dolĉaj bonodoraj
Flate flugas tra l' aer':
Nur ĉe l' Rejn' mi volas ami,
Ĉar okuloj mil al mi
Fulmas fajre: Nur ĉe l' Rejno
Rejnknabinoj amu vi!

Ke fremduloj fanfaronoj
Nur pri vin' el sia kel'
Kiam krake al plafonoj
Salas korko de botel':
Nur ĉe l' Rejn' mi volas trinki,
Nur de Rejnmontara vin',
Kaj amadi kaj trinkadi,
Ĝis alvenos mia fin'.

Kiam post vivado gaja
Mi alvenos je la cel',
Post amado, post trinkado
Min akceptos la ĉiel':
Nur ĉe l' Rejn' mi volas morti,
Kaj en lasta mia hor'
Lastan glason mi rompitan
En la Rejnon jetos for!

Venu do, vi tutmondanoj,
Al la bela Rejna bord':
Vin mirigis de l' rejnanoj
Korgajeco kaj konkord'!
Nur ĉe l' Rejno regas vivo,
Nur ĉe l' Rejno bonhumor',
Alrapidu do kaj vidu:
Ni akceptos vin el kor'!

(El germana lingvo tradukita. Dediĉita al ĉiuj samideanoj vizitontaj la rejan landon kaj precipe al la partoprenontoj de la Printempa Revela Kongreso 1921 en Köln.)

Legendoj de l' Rejno.

Je miloj nombrigas la sageoj, legendoj kaj rakontoj, kiujn la populbo rilatigas al la majesta rivero, al ĝiaj bordoj kaj insuloj, ĝiaj montoj kaj arbaroj, ĝiaj ruinoj, kasteloj kaj palacoj, ĝiaj urboj kaj vilaĝoj, ĝiaj preĝejoj kaj monaĥejoj. Jen reaperas en nia memoro la tempo de la Nibelungoj, kiujn la granda tonmajstro Richard Wagner prikantis en siaj senmortoj operoj. Jen la ĝojoj kaj malĝojoj de antikvaj popoloj; jen vivo kaj sorto de bravegaj aŭ rabemaj mezepokaj kavaliroj kaj ĉarmaj kastelfraŭlinoj, de meditemaj monaĥoj kaj amomalfeliĉaj junulinoj iĝintaj monaĥinoj; jen malnoblaj agoj kaj puno de diabloj, demonoj aŭ sangavidaj monstroj; jen suferoj kaj fina feliĉo de rabitaj aŭ ensorĉitaj belaj knabinoj; jen brilo kaj gloro de potencaj princoj, episkopoj kaj aliaj potenculoj nun jam delonge putriĝintaj en tombo; — tutaj jarmiloj revekiĝas kaj releviĝas antaŭ nia spirita okulo kaj sortas fantazioplenajn bildojn.

Kelkaj el la plej konataj tiaj legendoj sekvu ĉi-sube, kondukante la tutmondan legendaron por kvarona horo en la ne-ĉerpeblan trezorejon de l' rejna popolo.

1. Estiĝo de la Sep Montoj.

En antikva tempo la Rejno finiĝis apud la urbeta Königswinter formante tie profundan lagon. Por defluegi la akvon, oni venigis sep fortikajn egulojn el la lando de l' gigantoj. Ĉiu venis kun grandega fosilo. Baldaŭ estiĝis fendo en la montaro, tra kiu la akvo defluegis al la maro. Riĉe rekompencite, la eguloj frape purigis siajn fosilojn kaj foriris, kaj el la pecoj da roko kaj tero, kiuj estis gluiĝintaj sur la fosiloj, estiĝis la sep montoj. En plinovna tempo la nanaĵo provis derompi la pintojn de la montoj; sed nun ilia potenco jam ĉesis, kaj la sep montoj restos ĝis la lasta tago de la mondo.

Rejnlando kaj Vestfaliao, la du okcidentaj provincoj de la germana ŝtato Prusio, per multaj historiaj kaj ekonomiaj rilatoj interligitaj unu kun la alia, estas kulture tre altestarantaj landoj. Rejnlando, okupante teritorion de 27000 kvadrat-kilometroj, havas pli ol 7 milionojn da enloĝantoj; Vestfaliao nutras sur 20000 kvadrat-kilometroj pli ol 4 milionojn.

Ambaŭ provincoj posedas grandan agrikulturon, precipe en la vastaj ebenaĵoj de l' nordo; sed pli grava estas la alt-evoluinta industrio, kiu precipe en la „rejna-vestfalia industria distrikto“ kreis al si kompaktan centron, je simila grandegeco trovbla nur en Saksujo kaj en kelkaj distriktoj de Anglujo kaj Usono. Tuta reto da grandurboj troviĝas tie. Jen la ĉie en la mondo konata Essen, antaŭe la urbo de l' kanonoj, kie en tiu ĉi jaro okazos la 10-a Kongreso de Germanaj Esperantistoj; jen la plej granda riverhaveno de Eŭropo: Duisburg, jen la artamanta, bele konstruita Düsseldorf, jen la „dunaskiuita“ urbo Elberfeld-Barmen, jen sur vestfalia tero Dortmund, la plej granda urbo de Vestfaliao. Ĉefurbo de tiu ĉi provinco estas Münster, lokita meze de fekunda regiono, universitata urbo kaj sidejo de episkopo.

Ankaŭ en aliaj regionoj de Rejnlando la industrio hejmiĝis. La nomoj Krefeld, M.-Gladbach, Aachen kaj Düren havas bonan famon. Okcidente de Köln (Kolonoj), la plej granda urbo de Rejnlando, universitata urbo kaj sidejo de ĉefepiskopo, kaj Bonn, ankaŭ universitata urbo, kie la Rejnrivero forlasas la montojn kaj larĝe enfluas la rejan ebenaĵon, etendiĝas riĉa brunkarba distrikto, speciale interesa por la legantoj de ET, ĉar tie estas la malgranda loko Horrem, belete situanta apud aliaĵo, kun la esp. edonejo de la gefratoj Jung. Ankaŭ la Saarlando ekonomie apartenas al Rejnprovinco.

Konata estas la ĉarmo de la rejnlandaj kaj vestfaliaj naturbelaj: la idiliico de la valoj kaj la beleco aŭ intereseco de la montaro. Antaŭ ĉio la Rejno mem, traborinte sian vojon tra la montaroj de Bingen ĝis Bonn, estas la celo kaj la sopiro ne sole de ĉiuj germanoj, sed ankaŭ de multaj eksterlandanoj. Verdaj estas ĝiaj akvoj, kiuj portas malgrandajn kaj grandajn ŝipojn kaj boatojn; verdaj kaj fruktodonaĵ estas ĝiaj bordoj;

Kelkaj pretendas ankaŭ, ke la Sep Montoj estas tiu montaro, en kiu vivis Neĝblankulino kun la sep viretoj.

2. La Kaverno de l' Drako.

En la tempo, kiam kelkaj germanoj alprenis de S-ia Materno la religion de l' Kruco, loĝaĉis en kaverno de l' Draka Roko terura drakego, kiu minacis homojn kaj bestojn. La idolanoj faris al ĝi diajn honorojn, eĉ oferis al ĝi homojn. Foje militirinte ili rabis kristaninojn de admirinda beleco. Iliaj du estroj interdisputis pri ŝi, kaj por eviti batalon la saĝa ĉefpastro decidis, ke la virgino estu oferata al la drako.

Jam ŝi estis ligita sur la rokon, jam la monstro ekflugis el la profundaĵo al la oferstono, jam ĝi malfermegis la fajrospirantan faŭkon, — kiam subite la virgino prenis el la interno de sia vesto oran krucon kaj levis ĝin kontraŭ la monstron. Ĉi tiu falegis, kvazaŭ trafite de fulmo, de la roko en la akvojn de l' Rejno.

Kiam la idolanoj sciigis, ke la bildo de la dio de l' kristanoj pereigis la drakon, ili konvertiĝis, kaj la virgino fariĝis edzino de unu el iliaj princoj. En la valo konstruiĝis kristana templo kaj sur la pinto de l' Draka Roko impona kastelo. Tiu ĉi fariĝis la loĝejo de la nove geedziĝintoj kaj la devena kastelo de la grafoj de Drachenfels (= draka roko).

3. La Monaĥo de Heisterbach.

Inter la monaĥoj de Heisterbach (iama monaĥejo apud la sep montoj, detruita de Napoleono) juna Frato Maŭrus disingiĝis per riĉega scio, kaj eĉ la prioro konfesis sian malsuperecon. Sed la riĉa scio de l' juna frato estis difektata de dubo. Ĉiam li meditis pri la eterneco kaj pri la sentenco de la Biblio: „Mil jaroj estas ĉe la Sinjoro kiel unu tago.“

verdaj je arbaroj estas multaj el la montoj etendiĝantaj apud ĝi, dum aliaj estas kovritaj de miloj kaj miloj da vinberujoj. Interesaj estas ĝiaj urboj kaj urbetoj: Bacharach, St. Goar, Boppard, Koblenz, Andernach, Godesberg, Bonn kaj aliaj, admirindaj ĝiaj grandiozaj ruinoj kaj belegaj kasteloj.

La plej ĉarma parto de la Rejnvalo estas eble la parto sude de Bonn, kie la majesta rivero preterfluas la tiel nomatajn Sep Montojn unuflanke, kun la romantika „Draka Roko“ staranta inter la allogaj urbetoj Königswinter kaj Banloko Honnef, kaj aliaflanke la iaman vulkanon Rodder-Monto, kaj kie ĝi formas du idiliajn insulojn: Grafenwerth kun restoracio kaj Nonnenwerth kun silenteca monaĥejo. Tie oni imagas esti forsorĉita en sudan landon, al la Mediteraneo, al la Riviero aŭ al la bordoj de Grekujo.

Nun francaj soldatoj gardostaras apud la Rejnrivero, rigardas admire la rokaĵn montogigantojn je la alia bordo kun iliaj antikvaj ruinoj kaj modernaj kasteloj, kaj — kvankam ilia aspekto vekas maldolĉajn memorojn en germanaj koroj — per la plaĉa koloro de sia uniformo portas eĉ pli grandan variecon en la jam sufiĉe multkoloran bildon. Sed ankaŭ civilaj eksterlandanoj multnombre promeniĝas aŭ -veturas laŭ la bordoj de l' rivero aŭ sur la bone zorgataj vojoj en la montoj, — sidas sur la ferdeko de oportunaj vaporŝipoj aŭ en rapidaj motorboatoj, aŭ sur la terasoj de lukse instalitaj restoracioj kaj hotejoj. Ĉiujn lingvojn de la mondo oni povas tie aŭdi: francan, anglan, holandan, hispanan, italan, rusan — foje ankaŭ Esperanton; ĉar ofte la samideanoj de Köln, Godesberg, Koblenz kaj aliaj urboj, kunvenas por fari siajn ekskursojn, kaj ofte la francoj, angloj, amerikanoj aŭ alinacianoj ekhaltas kaj sin demandas, kia lingvo estas tiu stranga, nekonata, hispane aŭ itale sonanta dialekto, parolata ĉi tie apud la Rejna bordo.

Sed nun la jam sufiĉe longa babilado ĉesu; alie la redaktoro plendros pri forŝto de loko. Nur unu peton ankoraŭ: Se samideanoj el iu ajn lando foje venos en ĉi tiun belegan regionon, ili sciigu antaŭe la amikojn apud la Rejno (UEA!) aŭ la redakcion de ET, por ke oni povu aranĝi ekskursojn kun ili kaj montri al ili la multajn vidindaĵojn, kiujn posedas nia alloga lando.

Tiel meditante, li foje forlasis monaĥejon kaj monaĥejan ĝardenon kaj vagadis en arbaro. Lacigite per la longa migrado kaj la turmentantaj pensoj, li falis teren sub arbo kaj ekdormis. Kiam li vekigis, sonoris ĵus la vespersonorilo. Li kuris preĝejon, sed trovis sian lokon okupitan de nekonnata frato. Kaj ĉiuj fratroj estis fremdaj.

Nun li konsciigis, ke li dormadis tricent jarojn, kaj frostotremo skuis lin. Li falis teren kaj mortante admonis la monaĥojn, ke ili ĉiam atentu la vortojn de Dio kaj ne provu kompreni, kion Li kovris en saĝa intenco.

4. Rolando kaj Hildegardo.

Hildegardo, filino de l' grafo Dietrich de la Draka Roko, estis fianĉino de kavaliro Rolando, plej brava kavaliro de la regiono. Kiam foje li estadis ĉe amiko apud la Mosel-rivero, kavaliro de la „Leona Kastelo“ (unu el la sep montoj) sieĝis la drakan kastelon.

Jam ĉiuj provizoj estis foruzitaj, kiam en lasta horo kavaliro Rolando helpe alrapidis kun siaj vitoj; samtempe la sieĝantoj faris atakon el la kastelo. Terura estis Rolando en la batalo, neniu povis rezisti al lia glavio; sed en la interbatalado li bedaŭrinde ankaŭ mortigis la nekonnatan patron de sia fianĉino.

Hildegardo jam ne volis edziniĝi al tiu, kiu mortigis — kvankam erare — sian patron. Ŝi iris en la monaĥejon sur insulo Nonnenwerth (= monaĥina insulo). Rolando, frapite per la fatalo, konstruiĝis kastelon sur krutega roko super la insulo. Tie li loĝadis en profunda doloro, kaj ofte li staradis apud la fenestro kaj melankolie rigardadis malsupren al la monaĥejo, kiu enhavis lian tutan feliĉon.

Nun la kastelo de Rolando estas ruiniĝinta, kaj restis nur granda amaso da ŝtonoj kronita de la in. Roland-Arkajo (iama pordego).

La Esperanta Movado en Rejnlando kaj Vestfalio.

Antaŭ la milito en Rejnlando kaj Vestfalio estis tre vigla Esperanta vivo. Precipe de post la tempo, kiam Revelo eldonis propran ligan organon „Progreso“ sub redakcio de ĉefred. Hartenfels en Hagen, la movado rapide ekfloris. Ĉie, eĉ en malgrandaj urbetoj, fondiĝis grupoj, okazis paroladoj kaj kursoj, estis belaj samideancaj festoj.

La milito detruis ĉion. Tamen, ankaŭ dum la terura infera furio skurĝadis la erare vagantajn popolojn de la kvin mondpartoj, kelkaj fervoruloj (inter ili nia fidela amiko Pillath en Essen) sukcesis viviĝi la movadon kaj atingis dum kelka tempo konsiderindan sukceson. Sed tro longe daŭris la mondmezorego, la intereso por Esperanto fariĝis preskaŭ nula pro la pli gravaj, pli premantaj zorgoj de l' ĉiutaga vivo, kaj denove ekdomis la movado.

Eĉ la unua t. n. „paca“ tempo post la milito ne povis krei daŭran revigligon. Kvankam la oferemo de s-ro Junker en Köln kaj Jung en Horrem, kiuj per reeldono de la „Progreso“ provis rekolekti la disigitajn samideanojn en okcidenta Germanujo, denove por momento ekflamis la entuziasmon, tamen la vivo ne jam ekiris sian regulan vojon. La paralizo pro la fina malvenkego de Germanujo post tiom da brilaj venkoj, la politika kaj ekonomia necereteo, la okupacio, revolucio — ĉio ankoraŭ malhelpis seninterrompan progresadon. Tial fine s-ro Junker kaj Jung, konvinkinte ke ilia ega laboro estas senŝanca, ĉesigis la eldonadon de la „Progreso“ por atendi pli konvenan tempon. Tamen, ilia laboro ne estis senutila. Oni nun almenaŭ posedis la aktualajn adresojn de la samideanoj, kiujn oni povus rekolekti tuj, kiam la tempo tion ŝajnus rekomendi.

Tiu tempo jam baldaŭ ekestis. Post bona preparado, per personaj intervizioj kaj kunaj ekskursoj de diversaj grupoj kaj izoluloj, ĉe kiuj elmontriĝis vera samideaneco, oni fine decidis okazigi la 1-an Postmilitan Revelan Kongreson en Düsseldorf la 19. sept. 1920. Ĝi estis vizitata de samideanoj el 20 diversaj lokoj, detale priparolis la situacion kaj elektis la Kolonian grupon kiel prezidantan, por ke ĝi prizorgu la aferojn de Revelo kaj gvidu la ligan al nova forto kaj florado. Samtempe oni decidis proponi la urbon Essen por kongresurbo de la 10-a Kongreso de Germanaj Esperantistoj.

Tiu propono estas poste akceptita de la estraro de GEa, tiel ke je Pentekosto nuparija la samideanoj el tuta Germanujo kaj eble ankaŭ kelkaj eksterlandanoj kolektiĝos en la fama industria urbo Essen, por doni denove pruvon pri la vivkapableco kaj efektiva vivo de Esperanto kaj pri la energio kaj forto de la germanaj esperantistoj.

La grupo Köln, elektite kiel prezidanta grupo de Revelo, elektis poste la Revelan estraron el siaj membroj: s-ro Junker (prez.), s-ro Hurler (vicprez.), f-ino de Haas (sekr.) kaj s-ro Jung (kas.). La nova komitato tuj post sia elekto komencis energian kaj, antaŭ ĉio, intensegan laboron. Unu cirkulero sekvis al alia, grupoj kaj izoluloj apenaŭ povis ekspiri, tiom nia senlaca s-ano Hurler (en la nomo de la Revela estraro) bombardadis ilin per la cirkuleroj.

Kolonja Humoro.

La kolonjanoj estas gaja popolo. Precipe kiam ili en siaj malnovaj hejmejoj bierojlo amike kunesidas ĉirkaŭ la kutimtablo por trinki sian „Kölsch“ (kolonia biero) kaj rakonti al si reciproke en sia originala platermana aŭ en sia komika altgermana dialekto („Hochdeutsch mit Knubbeln“) la plej novajn humorafetojn (tn. „Krätzchen“), kiuj estas plejparte tre drastaj.

Kiu ŝatas bonhumoron kaj ne sentas sin tuj ofendata per iom drastaj ŝercaĵoj, estas bonvena, ankaŭ estante fremdulo. Sed kiu malbonmiene aŭskultas kaj sin montras ĝena, estas primokata kiel „Mucker“ (hipohondrulo), kiun devas eviti ĉiu honorinda homo.

Antaŭ la milito la gajeco de la kolonjanoj atingis ĉiam sian plej altan gradon en la antaŭ-karnavala tempo, kiam okazis multe da paroladoj kaj prezentadoj, spicialj je bonkora humoro sed ankaŭ je akra moko kaj ironio, kaj multe da grandaj festenoj kaj maskobaloj. La krono de la karnavalaj plezuraj estis je Roza Lundo, kiam grandioza procesio de pompveturiloj, belkostumaj kavaliroj kaj piedirantoj, akompanataj de multaj orkestroj, moviĝis tra la stratoj de la urbo. Plej pompaj estis ĉiujfoje la veturiloj de l' Princo Karnavalo kaj de l' Koloniaj „Kampulo“ kaj „Virginio“. Tiam la stratoj estis plenaj je homoj, de ĉiuj fenestroj kaj balkonoj la delikataj manoj de belulinoj jetis diverskolorajn paperajn „aerserpentojn“ super la procesion por ornamati veturilojn, ĉevalojn kaj homojn, kaj ricevis rekompence de la fieraj kavaliroj aŭ eble de la Princo mem bonodorajn florbukedojn aŭ bongustajn bonbonojn kaj oranĝojn. La karnavalaj tagoj estis tiuj tagoj, je kiuj la kolonjano ne predevis festeni kaj diboĉi. Por tiuj tagoj li ŝparis dum tuta jaro, ĉar sen festene travivita karnavalo la antaŭmilita kolonjano ne povis ekzisti. La kolonia karnavalo do estis vere popola festo. Certe nun, post la tiel malfeliĉe por Germanujo finiginta milito, la emo je brilaj kaj bruaĵaj festoj multe malgrandiĝis; tamen, la bonhumoro iom

La sukcesoj estas do laŭ la laboro: 20 grupoj (Benrath, Bochum, Bottrop, Düsseldorf 2, Elberfeld, Essen 2, Friedrichsthal, Godesberg, Gummersbach, Hagen, Horrem, Köln, Köln-Kalk, Krefeld, Münster, Solingen, Stollberg, Siegburg) kun 458 membroj kaj 51 izolaj anoj apartenas nun al Revelo. Krome ekzistas granda nombro de izolaj samideanoj kaj kelkaj malpli gravaj grupoj, pri kiuj oficialaj sciigoj mankas. Por la Printempa Revela Kongreso (9.—10. aprilio nunjara), kiu eĉ ne estos la ĉefa sed nur duaranga jarkunveno, sin anoncis pli ol 350 partoprenantoj, nombro, kiun ofte ne havis granda nacia kongreso.

Ke tiu ĉi progreso ne haltu, sed daŭru en bona tempmezuro kiel ĝis nun, estas nia hodiaŭa deziro. Ni gratulas la Revelan estraron pro ĝiaj efektivaj sukcesoj; sed ni tre esperas, ke ĝi ne laciĝu en sia fervoro kaj energio. Kaj al ĉiuj anoj de Revelo, kiuj pretendas esti seriozaj batalantoj por nia afero, ni „metas insiste al la koro“, ke ili ne lasu laboregadi nur la kelkajn fervorulojn, al kiuj ili transdonis la komitatecon, sed ke ili laŭeble helpadu kaj subtenadu la komitaton. Ĉiu sciu sian devon! Alie la ĵus atingitaj belaj sukcesoj disvaporiĝos kaj restos nenio ol melan-koligita rememoro pri iama grandeco.

Do, esperantistoj al la fronto! Seriozaj batalantoj por la afero: ne priridindaj entuziasmeuloj-ŝovinistoj, sed bonaj esperantaj patriotoj! Tiam nia sukceso estos ne nur pormomenta sed daŭra, konstanta!

Kolonjo, la Krono de l' Rejno.

El la Historio de la Urbo.

Marcus Vipsianus Agrippa translokigis en 58 a. Kr. la Ubiojn de la dekstra bordo de l' Rejno al la nuna Köln'a regiono. En 50 p. Kr. la centro religia kaj politika de la Ubioj fariĝis romana kolonio, kaj ĝi ricevis la nomon *Colonia Claudia Augusta Agrippinensis*, por honori la plijunan Julia Agrippina, filino de Germanicus, naskita ĉi tie en 16 p. Kr. Poste la kolonio ricevis la „ĵus italicum“, fariĝis ĉefurbo de la provinco kaj kelkfoje imperiestra kortegejo.

En la 10-a jarcento la ĉefepiskopo de Köln fariĝis arkikancelieroj kaj ricevis specialajn rajtojn, kiuj kaŭzis poste multajn gravajn kaj sangajn batalojn kun la urbanoj.

De la 13-a jarcento la ĉefepiskopo fariĝis princ-elektistoj, kiuj longe bataladis kun la „libera regnurbo“. Fine venkis la libereco de la urbanoj, gvidataj de iliaj famaj gentoj.

Nun komencis grava ekfloro de la artoj (la Köln'a pentristoskolo), de la metioj (teksaĵoj), de la armitistoj ktp. Ĉefe vastiĝis ĝia nomo kiel komerca urbo. Ĝi estis la centro inter Grekujo, Hungarujo, orienta Germanujo kaj la Nederlandoj, norda Francujo, Anglujo kaj Danujo. Jam en la 12-a jarcento la Köln'aj komercistoj posedis en London propran faktorian, la „Guildhall“, poste nomita „Stalhof“. Köln fariĝis unu el kvar ĉefurboj de la „Hansa“, potencega ligo de urboj.

Post la eltrovo de Ameriko la monda komerco ŝanĝis la vojojn, kaj Köln perdis ilin sian gravecon.

Per la Napoleonaĵoj militoj Köln perdis siajn rajtojn kiel „libera regnurbo“. Post 1815 sub la „prusa urbordo“ ire libera ĝi denove komencis

post l'om regajnas sian kampon, kaj oni povas supozi, ke post kelke da jaroj ankaŭ la tradicia karnavala festo denove ekfloros en la rejna metropolo, kvankam la „bona malnova tempo“ neniam revenos kaj pro tio ankaŭ la iama originaleco, freŝeco kaj vereco de la festo eble por ĉiam estos pasintaj.

Kelkaj koloniaj „Krätzchen“ servu al nia internacia legataro kiel pruvo pri la bonhumoro de la kolonjanoj.

1. Soifo de la Kolonjanoj.

Rentulo Schmitz (en Köln ĉiu honorinda homo havas la familinomon „Schmitz“) fanfaronas ĉe la kutimtablo, ke li deposed dek jaroj ne trinkis akvon, ke de tiu tempo eĉ ne unu guto da akvo venis super liajn lipojn. „Ne tiel fanfarone, kara sinjoro,“ diris unu el la kutimgastoj, „ĉu vi neniam purigas viajn dentojn?“ — „Ho jes, sed por tio mi havas speciale delikatan Mosel-vineton!“ estis la tuja respondo.

Pitter (Petro) diras al Kress (Kristiano): „Ha, la soif-aferon mi bone aranĝis hejme. Mia Trina (Katarino) devas min vekti ĉiunokte, kiam mi soifas.“ — „Sed kiamaniere ŝi povas scii, ke vi soifas?“ — „Malsaĝulo! Ŝi iam ajn veku min, mi soifas ĉiam!“

2. La Berlinano kaj la Foiristino.

La berlinano ne estas tre ŝatataj de la kolonjanoj. Oni diras pri ili, ke ili havas „sufiĉe grandan buŝegon“, ke ili fanfaronas pri sia urbo kaj ĝiaj aranĝaĵoj kaj malgrandigas la preferaĵojn de aliaj urboj. Foje staris berlinano antaŭ la Dom (katedralo) kaj efektive admiris la grandiozan konstruaĵon. Tamen li ne povis sin deteni fari rimarkigon al apude staranta kolonjano: „Hm, certe grandioza! Mi ne pensis, ke vi kolonjano povus konstrui tian domegon!“ — „Ni ja ne konstruis ĝin, sinjoro,“ estis la respondo, „oni ĝin sendis al ni komplete de Berlino.“ — Aliafoje, berlinano, al kiu oni estis rakontinta, ke la koloniaj foiristinoj povas drastege insulti, diris: „Jen, kara virino, estas 10 pleniĝoj! Nun vi insultu kion

ekflori. Kaj post 1881, kiam falis la urbmuoj, kies kelkaj restoj ankoraŭ estas videblaj, la urbo fariĝis urbejo kun pli ol 660 000 loĝantoj.

Rimarkindaj Konstruaĵoj ktp.

La Katedralo (Dom), fondita 1248; paŭzo de l' konstruado de 1560 ĝis 1842, fino 1881. Ĝi estas longa 144 m, larĝa 61 m, alta 61 m; turoj 157 m. Areo 6600 m², 24 000 homoj trovas en ĝi lokon. Oni povas supreniri la turojn: Vidindaj estas la ĥorejo kaj la trezorejo. Aŭdinda la ĥoro kantanta la ĉefmeson (dimanĉe 9⁰⁰ atg.).

La baziliko St. Gereon fondita 1056, belega preĝejo. La baziliko St. Ursula fondita 1020 (trezorejo). Preĝejo St. Aposteln el la 12-a jarcento, belega pure romana konstruaĵo (mozaikoj). St. Maria im Capitol preĝejo el 11-a jarcento, belega pentrita, fama orgeno (dimanĉe post la lasta meso 11⁴⁰). La preĝejo estas konstruita sur la loko, kie verŝajne estis la romana kastelo. Aliaj rimarkindaj preĝejoj: St. Kunibert (fenestroj de l' ĥorejo), St. Martin (la turo), St. Severin, St. Andreas, St. Peter, St. Cäcilia, St. Maria-Himmelfahrt, St. Maria (Schnurgasse), St. Maria (Kupfergasse), Minoriten, St. Maria-Lyskirchen, St. Johann, St. Jakob, St. Mauritius, St. Paulus, Herz Jesu, St. Agnes kaj multaj aliaj.

Protestantaj preĝejoj: St. Pantaleon, Trinitatis-, Christus-, Luther-preĝejo.

Sinagogo en Glockengasse kaj apud Königsplatz.

Malnov-katolika preĝejo: Auferstehungskirche en Moltkestr.

La Gürzenich, mezepoka festalongo, belega murpentraĵoj pri la historio de Köln. En ĝi okazas la famaj koncertoj kaj urbaj festenoj. La urbdomo Rathaus, partoj estas fonditaj en 14-a jarcento. Rimarkindaj la enireja laŭbo, la turoj kaj la salonegoj. En ĝi okazis la kunsidoj de l' urbkonsilistaro, por kiuj oni nun konstruis novan salonegojn en la kontraŭa „hispana konstruaĵo“. Apud Gürzenich la dua urbdomo Stadthaus, moderna, pro sia bela simpleco rimarkinda domego.

La operejo (Opernhaus) grandega konstruaĵo moderna. Ĝi enhavas unu el la plej grandaj scenejoj. Brilaj prezentadoj de operejo kun mondfamaj orkestro kaj artistoj. La dramejo (Schauspielhaus) en Glockengasse.

La Universitato moderna ega konstruaĵo ĉe Römer-Parko. Ĝi enhavas ankaŭ Komercan Akademion. Apud Hansaring troviĝas la Komerca Lernejo. En la najbareco de l' Universitato troviĝas la ŝtata Maŝinkonstru-Lernejo kaj apude la Instituto por akceli la Metiojn de la Rejnprovinco.

La Komerca Cambio havas sian sidejon en Tempelhaus, Rheingasse (el la 14-a jarcento). Apud Neumarkt, meze en la urbo, la granda centro de la polico, la Polizei-Präsidium. En la najbareco de la Ĉef-Ŝtadidomo, kiu havas unu el la plej grandaj haloj, staras la Ĉef-Postoficejo, la Postĉefoficejo kaj la Regna Banko.

Köln havas du justec-palacojn: bela ruĝbrika konstruaĵo ĉe Appelhofplatz, Kriminal-Tribunalo, kaj ĉe Reichenspergerplatz la grandega Supera Land-Juĝejo. Apud la unua troviĝas la Land-Financoficejo en la antikva Armliejo. Apud Neumarkt etendiĝas la Foir-Haloj.

ajn!“ La efiko de tiuj ĉi vortoj estis miriga: „Vi malsata pruso, aĉetu al vi por la groŝo pajlon por bruligi viajn pulojn!“

3. El la bona malnova tempo.

Apud la bordo de l' Rejno kuŝis granda trenboato plena de grajno. Dum la elŝarĝado oni rimarkis, ke en la boato estis ratoj, kiuj ĉion ekmordis. Guste tiam holanda ŝipo kun fromaĝo kuŝiĝis laŭlonge de la trenboato. Diris la direktillisto al la boatestro: „Kiom mi ricevos, se mi forigos la ratojn?“ — „5 talerojn, se vi volas!“ estis la respondo. — „Konsentite!“ diris la direktillisto. Kaj nokte, kiam la fenestroj de la fromaĝo-ŝipo estis malferritaj por aereumo, kaj sentbligiĝis la akra odoro de l' fromaĝo, la direktillisto metis trabon de sia boato al la holanda ŝipo, tiamaniere konstruante ponton, kaj observis kun la boatestro, kiel la ratoj are transmigris. Kiam ĉiuj ratoj estis transe, li fortiris la trabon kaj rimarkigis: „La ratoj nun faros truon en la fromaĝo, tiel ke la holanda fariĝos svisa fromaĝo: do la ŝipestro ne havas malprofiton, ĉar svisa fromaĝo estas pli kara ol holanda; nin ne plu ĝenos la ratoj, kaj mi gajnis 5 talerojn!“

4. Tünnes antaŭ la ĉiela pordo.

Tünnes (Antonio) foje aŭdis, ke oni povas veni en ĉielon eĉ pekinte, se oni estas edziĝinta. Trankvile li pekis plu, kaj, alveninte supre kaj eĉ aŭdinte Sanktan Petron dirantan al alia: „Eniru, malfeliĉulo, vi ja estis edziĝinta!“, li tuj anoncis sin per la vortoj: „Kara Petro, mi estis eĉ dufoje edziĝinta!“ — „Kion?“ diris Petro, „tiam zorgu, ke vi foriĝu! Tiajn azenojn ni ne bezonas ĉi-supre.“

Kolonjaj Proverboj.

Kruĉo iras tiel longe al la puto, ĝis — venos akvokonduko.

Pli bone muŝo en potu ol nenia viando.

Ankoraŭ ne falis maistro de la ĉielo: alie li estus rompinta sian kolon.

Kie loĝas laktokulturisto, tie staras ankaŭ pumpilo.

Brikekdvendisto povas bone kalkuli, sed malbone nombri.

Krom la ĉef-stacidomo Köln posedas 7 staciojn. La tramoj etendiĝas per reto enhavanta pli ol 300 kilometrojn, kiu kunigas la antaŭurbojn kun la urbocentro. Krom tio stelforme radias alstaraj tramoj kaj la interurba „Rheinuferrahn“ al Bonn, modela komunikilo de granda rapideco.

Tri grandaj feraj pontoj kondukas super la riveregon: la Suda Ponto (Südbrücke) por fervojo kaj piedirantoj, la Penda Ponto (Hängebrücke) por tramoj, veturiloj kaj piedirantoj, tre interesa teknika konstruaĵo, kaj la Ponto de la Hohenzoller'oj (Hohenzollerbrücke) konsistanta el tri apudaj (du fervojaj kaj unu strata) pontoj. Al antaŭurbo Mülheim kondukas boaponto.

Sur la Rejno granda trafiko de vaporŝipoj. La pasaĝerŝipoj povas enteni ĝis 2500 homoj, la tren-vaporŝipoj trenadas ĝis 7 trenŝipoj, kies longeco povas atingi 160 metrojn kaj enhavo 4000 tunojn. La rem- kaj naĝ-sportoj estas tre ekzercataj.

Multaj muzeoj ornamas la urbon. Najbare al la katedralo la Walraff-Richartz-Muzeo (pentraĵoj kaj skulptaĵoj), ĉe Ubbiering la Rautenstrauch-Joest-Muzeo (etnologia), ĉe Hansaring Armetia Muzeo (Kunsgewerbemuseum), apude Schnütgen-Muzeo (por eklezia arto) kaj Muzeo por Orient-Azia Arto (tre vizitinda). En Stapelhaus apud la Rejno inter la du ĉefaj pontoj estas bela Naturhistoria Muzeo. Krom tio prahistoria, komerca, historiaj, muzikhistoria, eklezia muzeoj.

La urbo havas multajn malsanulejojn de malgrandaj ĝis la giganta „Lindenburg“.

Monumentoj vidindaj: Imperiestro Vilhelmo I. (Kaiser Wilhelm-Ring), Imperiestro Frederiko III. (Deutscher Ring — 129 m. larĝa, do la plej larĝa strato) kaj sur Hohenzollernbrücke, kie troviĝas ankau Imperiestroj Vilhelmo I. kaj II. kaj Reĝo Fred. Vilhelmo IV. Sur Heumarkt Fred. Vilhelmo III. kun la ĉefaj personoj de la tiama tempo, la plej granda el ĉiuj bronzaĵaj rajdist-monumentoj (ĝi pezas 34850 kg). Krome multaj interesaj kaj belaj monumentoj kaj fontanoj.

Gardenoj troviĝas sur la belega „ringoj“ (bulvaroj) kiuj ĉirkaŭas la malnovan parton de la urbo. Parkoj: Volksgarten, Stadtpark, Römerpark, Südpark, Vorgebirgspark, Stadtwald, Blücherpark, Gremwald. Privataj: Rennbahn, Flora, Zoologia Ĝardeno.

La plej grandaj magazenejoj troviĝas ĉe Hohestrasse (Tietz) kaj Breitestrasse (Peters).

De la antaŭaj urb-fortifikacioj restis kelkaj turoj, pordegoj kaj du partoj de la muroj.

Kelkaj datoj pri la evoluto de Köln: loĝantoj en 1794 — 44512; 1815 — 48000; 1888 — 211353; 1910 — 476200; 1921 — pli ol 660000.

Kiu deziras ĝui nekompareblan urbobildon, rigardu Köln-on de la dekstra bordo de l' Rejno, de Deutz, inter la du ĉefaj pontoj. Precipe vespere, kiam la suno malleviĝas, la silueto de l' urbo estas ĉarmega.

Unua arto.

La filino idolana
Sidas en arbara denso,
Blanka vesto diafana
Brilas hele kiel penso,
Kion ĝuste ŝin surprizas,
Dum ŝi lignokapon ĉizas.

Tiu kapo, — ŝi babilas, —
Estas mia granda sorto:
Kion ain ĝi min konsilas,
Fidas mi al sorĉovorto.
Sankta estas ĝia spiro,
Buŝo de profeta viro.

Formas kapon mi el ligno
Laŭ mistera profetaĵo.
El la ombroj kaŝa signo
Lumas, — mano de diaĵo.
Ha, ĝi sentas vivon fortan,
Kapon kreas mi senmortan.

Kiam morgaŭ suno brilos,
Mi ekpensos mian sorton.
Kun diaĵo mi babilos,
Aŭdos la profetan vorton.
Kion ajn la kapo diras,
Sankta ŝajno min inspiras.

La filino idolana
Sidas en arbara denso,
Sur vizaĝo pur-infana
Brilas aliĉea penso.
Sankta fajro ŝin inspiras,
Lignan kapon ŝi admiras . . .

N. Barthelmess, Düsseldorf.

Se

la teksto en la hodiaŭa numero de ET al vi plaĉas, kompilu similan tekston pri via regiono aŭ urbo. Preferinde estas priskribo de tiaj regionoj kaj urboj, kie okazas aŭ -os esp. kongresoj. Dezirante, ke nia ĵurnalo estu nepre internacia, ni petas precipe niajn negermanajn legantojn utiligi tiun ĉi eblecon konigi al la tuta mondo siajn regionojn, urbojn, kantojn, legendojn, popol-sjarojn ktp.

La Komerca Ĉambro de Locarno (Svis.) sendas aproban leteron al la Komerca Ĉambro de Paris pro la decido enkonduki Esperanton en la komercon.

Associazione Commerciale-Industriale del Ticino.
Sezione di Locarno. Locarno, la 16. marto 1920.
Sottosegretario della Camera Cantonale di Commercio.

Al la
Komerca Ĉambro
Paris.

La gazetoj sciigas nin ke via Komerca Ĉambro decidis enkonduki Esperanton en la parizaj komercaj lernejoj, celante la faciligon de la komercaj rilatoj inter la diverslingvaj nacioj.

Ni aprobas kaj laŭdas vian decidon esperante ke ĝi estos sekvata de la tutaj komercaj organizoj de l' mondo.

Volonte ni korespondas en Esperanto kun ĉiuj alilingvaj institucioj kaj firmoj kaj ni dezirege atendas la ĝeneralan uzadon de Esperanto por la internaciaj rilatoj.

Bonvolu akcepti, estimataj sinjoroj, niajn sincerajn kolegaliajn salutojn.

Camera di Commercio
Locarno.

P. S.: Ni estas al vi dankemaj se vi havigos al ni detalajn raportojn pri via decido kaj via programo.

Tra la Mondo.

Eksimperiestro Karolo de Aŭstrio-Hungario forvolaĝis el Steinamanger.

Laŭ komuniko de Havas el Konstantinopolo estas konfirmate, ke la grekoj ĝenerale retiriĝas al la linio de Brussa. La turkoj persekutas energie. Laŭ Chicago Tribune, Usono kiel kreditoro de Eŭropo ricevas ĉiusemajne sendojn de oro. Depost 1. jan. alvenis oro en valoro de ĉ. du miliardoj da frankoj.

En Anglio strikas la ministoj. Multloke okazas bataloj inter strikantoj kaj policanoj.

La franca vaporŝipo Madeleine malaperis dum la navigado de Nicaa al Alĝerio. Oni ĉien radio-telegrafiis, sed sensukcese.

Internacia Esperanto-Servo.

LETERO EL PALESTINIO.

Haifa, marto 1921.

Bandoj de beduenoj detruis kelkajn pontojn de la fervojo Haifa-Damasko proksime de la stacio de Wadi Kel inter la lago Tiberias kaj Deraa; ili haltigis vagonaron, prirabis vojaĝantojn, vagonojn kaj stacidomon kaj returnis al siaj malfacile atingeblaj hejmoj. Cio okazis en teritorio franca ĉirkaŭ la mezo de februaro, kaj nur antaŭ kelkaj tagoj la fervoja komunikilo kun Damasko estas restarigita.

La fervoja sistemo palestina pliboniĝas konstante. Haifa komunikigaĵo ĉiutage, escepte dimanĉe, kun Egiptio, Sirio kaj Nablus, ĉefloko de Samario; kaj dufoje ĉiutage kun Aĵo, Jeruzalemo kaj Jaffa.

La komerca situacio daŭras esti malviva, sed agrikulturo promesas bonajn rikoltojn pro la abundo de dumvintira pluvo. Kulturo de tabako estas permesata al ĉiu, kaj la industrio intencas baldaŭan fabrikadon de cigaredoj pro konsumo enlanda kaj fremda, kaj preparadon pli perfektan de olivoleo. Olivarboj abundas en Palestino, sed olivujo ĝis nun kvazaŭ nur servis por fabrikado de ŝapo kaj tabloleo malmulte bongusta.

Palestino kun Egiptio, Afriko orienta kaj Mezopotamio estas nun konfinitaj al la speciala zorgo de Mr Churchill, kiu baldaŭ vizitos almenaŭ Egipton kaj Palestinon. Unuj konsideras tiun ĉi novan arangon damaĝo por la sankta lando, aliaj kontraŭe profito kaj sukceso, eĉ esperas ekokupon de la transjordana lando ĝis Akaba, haveno de la Ruĝa Maro kiel en tempo de Salomono, kun navigado en la Inda Oceano. Ju pli verŝajne la angla gubernio permesos al Egiptio aŭtonomion, des pli ĝi bezonos fortikigi Palestinon kaj la ĉirkaŭaĵojn de la Suez-Kanalo.

Ĝis nun, antaŭ la formala aprobo de la traktato de Sèvres, la palestinianoj ne scias ankoraŭ de kia nacio ili estas. Ili nek estas turkaj nek anglaj subuloj. Post la formala aprobo ĉiuj, judoj aŭ nejudoj, formas la novan nacion palestinan. Ĉar Rusio kaj la Unuigita Ŝtatoj ne partoprenis la traktadon, verŝajne ĉiuj judoj rusaj kaj amerikaj protestos kontraŭ tia difino.

Alproksimiĝas la grava Paska festo, kiu okazigis lastan jaron en Jeruzalemo grandan tumulton kaj sangofluon inter mahometanoj kaj judoj. Esperable antaŭrimedoj seriozaj evitos ĉian malordon kaj maltrankvilon dum la sankta semajno.

P. E. S.

Sporto.

ŜAKO.

Dum la ŝakturniro en Habana inter Capablanka kaj Lasker la kvina ludo estis gajnata de Capablanka. La kvar antaŭaj ludoj estis nulaj.

BICIKLO.

En la Sestaga Vetciklado de Parizo fariĝis unuaj la sviso Egg kaj la franco Seres, duaj fariĝis la belgoj Barts kaj Spiessen. Dum la tuta vetciklado la lukto okupis sole tiujn ĉi du parojn.

NETUKURO.

Novan mondrekordon starigis la amerikano Charles Paddock, trakurante spacon de 220 jardoj en 20,8 sekundoj.

Kroniko.

GENOVA (Ital.). Dank' al la senĉesa klopodado de ĉi-tia Laborista Esperanto Grupo kaj sekve de la enkonduko de Esperanto en la programon de la Popola Universitato de Genova, la 10-an de marto, prof. E. M. Caroli elokvente paroladis en la supre citita popola edukigo pri nia idealo, tre atente aŭskultata kaj varme akklamata de multnombra ĉeestantaro. La L. E. G. malfermos baldaŭ aliajn kursojn gvidotajn de s-ro Arabeno kaj Managlia. La kurso gvidata de s-ro Barni ĵus finiĝis. Kontentigan sukceson donis la organizita publika loterio, kiu profitonis al la L. E. G. neatenditan sumon uzotan por la propagando de Esperanto. La L. E. G. korege dankas ĉiun, kiu tute ĝentile kaj malavare sendis ĉu monon ĉu objektojn lotumotajn.

Recenzejo.

MEHRSIGNIGE DEUTSCHE WÖRTER IN ESPERANTO (Plursencaj germanaj vortoj en Esperanto). Durch Uebungssätze erläutert (Per ekzercaj frazoj klarigitaj) de Karl J. Loy. (Deutsch-Esperanto-Bücherei N-ro 3). 78 pg. 13 x 19 cm. Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin S 89. Prezo: Kartonita 5 mk. kaj 20 1/2 T. (multkosteca aligo).

En la jarkolektoj 1919 kaj 1920 de la monata gazeto Esperanto-Praktiko la aŭtoro jam aperigis la zorge kunmetitan frazaron de germanaj homonimoj, kiun li eldonigis nun laŭ deziro de multaj legintoj en formo de libro. Ĝi estas uzebla kiel leksikono, ĉar la vortoj estas alfabeto ordigitaj (entute 390). La aŭtoro do iom pligrandigis la en E.-P. presitan kolekton. Oni rajte nomos la libron tre valora helpilo por ĉiuj, kiuj fininte elementan kurson intencas sin perfektigi. Ĉiu Esp.-instruanto plezure ĉerpos el ĝi tiu fonto de naciaj idioj, kiujn oni ĝenerale ne povas traduki laŭvorte sed nur laŭsence. Negermanoj profite uzos la frazaron kiel lernilon por pli ampleksigi siajn konojn de la subtilaĵoj de l' germana idio. — La libro ne celas ĝi la vortarojn superfluaj. Ĝi estas kontraŭe grava komplemento, ĉar ĝi pritraktas nur la homonimojn, kiuj abundas en la germana lingvo. Kompare al ili ni ĝoje konstatis la simplecon kaj regulcon de la lingvo internacia, kies logiko kaj precizeco estas unikaj pro tio, ke ĝi ne ilom parolas en bildoj kiel naciaj lingvoj. — Esperable la verkafo de s-ro Loy estos tre disvastiĝata inter la germana gesamdeanaro. (G. Aĵul.)

AFIŜO, kun esp. teksto: „Il-a Oficiala Foiro de Specimenoj, Barcelona, 20-30. aprilo 1921“.

La afiŝo, granda 50:64 cm, presita sur aria papero, estas fariĝa en tre plaĉa fajenca maniero kaj bone plenumas la intencan reklamo per la foiro.

Anoncetoj.

LA RUSAJ SAMIDEANOJ ne havas la eblecon aboni eksterlandajn esp.-gazetojn kaj aĉeti esp. librojn kaj petas tial sendi al ili tiajn. Ĉiujn esperantojn sendu al Helmi Drezen, vicdel. de UEA en Tallinn, Estonio, p. k. 6, notinte la sendaĵojn per „por transsendo Rusion“. RAKONTETOJ. Al ĉiulandano, kiu sendos al mi ĝis 10. majo 1921 du-tri rakontetojn esperantigitajn el infana legolibro (krestomatio), mi respondos per bela vidadkartoj el Svisujo aŭ tavolo de svisa ĉokolado. (Mi ne bezonas rusajn nek francajn nek germanajn rakontetojn, ĉar mi ilin jam ricevis.) Ekster-eŭropanoj sendu ankaŭ. — A. Mexin, 65, Grand'Rue, Montreux, Svisujo.

DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERŜANĜI:

S-ro Rudolf Rosenfeldt, Estonio, Tallinn. Vaksali t'n n-ro 18, k. 1, interŝanĝas poŝmarkojn, poŝkartojn ilustr. kaj papermonojn.

S-ro Semjon Voroncov, Kaasani t. 19-5, Tallinn (Estonio), deziras korespondi kun fraŭlinoj.

S-ro Boris Rukaviŝnikov, Rusio, Ĉasovennaja 65, kv. 5, Saratov (adresu: Tallinn, Estonio, p. k. 6, por transsendo), deziras interkorespondi kun kolektantoj de monbiletaj ktp.

S-ro Michel Ambros, Zabalkanski pr. 55, Petrogrado, Rusio (adresu: Tallinn, Estonio, p. k. 6, por transsendo), deziras korespondi kun estonaj, japanoj kaj anglaj.

S-ro George Aŝanin, Nisokajala ul. 27, kv. 2, Kronstadt, Rusio (adresu: Tallinn, Estonio, p. k. 6, por transsendo), deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝmarkojn.

Postmarkojn perfektajn turkajn kapitulaciajn aŭ palestinajn maloftajn sendas P-ro E. Schmitz en Haifa, St. Charles, Palestino, al ĉiu sendinto iulanda de egalvaloraĵaĵi Seni aŭ Yvert 1921.

Alfred Proschka, poŝtofiŝeto, Kaaden, Bohemio, Ĉeĥoslovakio, interŝanĝas poŝmarkojn kun tiunondaj ĉi-landaj, interŝanĝas esperantojn gazetojn.

S-ro Sandor Lissauer, Szechenyi u. 55, Miskolc (Hungario), deziras korespondi per poŝkartojn ilustritajn kun la tuta mondo.

Abono al ET.

Ni liveras al ne-germanaj landoj: 50 n-rojn por 80 germ. mk., 10 ŝil., 10 sv. fk., 20 fr. fk., 5 hol. guld., 2 dolaroj aŭ 30 liroj (lirojn ni akceptas nur el Italio); 25 n-rojn por duona prezo.

Al Germanio, Baltiko kaj Balkano 10 n-rojn por 10 gmk. — Al Polio 25 n-rojn por 150 mk., al Aŭstrio kaj Hungario 10 n-rojn por 30 kronoj, al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 kr.

Oni pagu per monbiletaj aŭ bankĉekoj.

Germanoj pagu ĝis fino de junio al poŝtĉek-konto Köln 70863, Teo Jung, Horrem; post 1. julio ili abonu per la poŝto.


Negermanoj el bonvalutaj landoj ne pagu per poŝtaviĝoj, ĉar la poŝto donas parte nur 2/3 de la kurza valoro, kaŭzante al ni eviteblan perdon.

Gasmotor-Fabriko Deutz


Köln-Deutz (Germanio).

DEUTZ Motoroj

en ĉiuj grandecoj kaj specoj
por ĉia brulmaterialo
speciale por
Benzino, Benzolo, Petrolo,
Alkoholo kaj Nafto.




DEUTZ
Gasproduktiloj
Suĝgas-, Hejtgas- k.
Akvoprovizaj
Instalaĵoj.



DEUTZ DEUTZ
Motor-
Lokomotivoj
Lokomobiloj
Boatmotoroj.

Vertikalaj k. horizontalaj
Motoroj
Sistemo
Diesel.



Nur alskriboj de seriozaj firmoj estas konsiderataj.

Vapor-Kaldronoj

horizontalaj kaj vertikalaj, de ĉiu grandeco
*** kaj diversaj sistemoj, interalie ***

Babcock-Wilcox Akvotubo-Kaldronoj
por normala kaj tre alta vaporigo.

Fratoj Stork kaj K¹⁰ Hengelo (O) Nederl.

Nur petoj de gravaj firmoj estos respondotaj.

Esperanta-Pola Eldonejo NOWE TORY (LA NOVAJ VOJOJ)

fondita de prof. L. Kronenberg en Bydgoszcz, Polio.
(Telegramoj: Tory, Bydgoszcz).

Vendas kaj interŝanĝas
poŝtkartojn el ĉiuj plej vidindaj urboj de Polujo
(ĉefurbo Warszawa, fama preĝejo Czenstochowa,
salminejo Wieliczka, Krakovo, Leopolo, Lodzo,
montaro Karpatoj ktp.),
poŝtmarkojn eksterlandajn kaj polajn, tre mal-
ofitajn,
papermonon eksterlandan kaj polan,
antikvan monon nikelan, arĝentan.

Detalaĵojn por respondokupono.
Ne sendas unua.

Volas aĉeti

pli grandan kvanton da prespapero.

Peras

presadon de broŝuroj en polaj presejoj, malkostaj
pro la mona kurzo.

Donas komercajn informojn.


Serĉas interrilatojn kun presejoj,
eldonejoj kaj paperejoj.

Aranĝas reklamon en pola gazetaro.

Plena profito por propagando de Esperanto en
Polujo.

Brazilio!

Sinjoro J. BLOOMFIELD, komisiisto,
deziras reprezenti eksterlandajn firmojn.
Adreso: Strato Rosario, 152, 1-a etaĝo,
RIO DE JANEIRO, Brazilio.
Telegrafa adreso: TATU.



Janke & Kunkel,
Köln a Rh.
(R. Inlardo, Germanio)
Fabriko de Kemiaj
kaj Fizikaj Aparatoj
estas liveranto
de kemiaj, fizikaj kaj
:: elektraj instruiloj ::
kaj de kestoj por fari
:: eksperimentojn. ::
Nur seriozaj aĉetontoj
petu antaŭkalkulon!

Adolfo Oberrotman Varsovio, Polio, Krak-Przedm. 10

povas liveri al seriozaj pogranda filatelisto
kolekton da diversspecaj poŝtmarkoj, ĝis 50 serioj
diversaj: Ukrainaj, rusaj jubileaj Romanofi, rusaj
sovjetaj, kaj ĵus aperintaj en Litovio de generalo
Zeligowski. Ankaŭ malnovaj moneroj. La pago
per bankbiletoj, respond-kuponoj aŭ per neuzitaj
poŝtmarkoj.

INSTRUO AŬ KONTORO. Juna litova mezlerneja instru-
istino (esperantistino), dezirante perfektigi en uzado de
germana lingvo, volas pasigi 2-3 somerajn monatojn en
Germanio aŭ Svisio. Povas instrui litovan, latvan aŭ
rusan lingvon, korespondadi en ili aŭ okupiĝi en kontoro.
Proponojn adresu al: J. Mačernis, Kaunas, Ukmerges pl. 45,
Litovio.

ITALA LINGVO. La gesamideanoj dizirantaj helpon en la
lernado de l' itala lingvo, skribu al Luigi Pappo, via del
Bragone 1-5, Genova-Sturla, Italujo. Li certe respondos.

Angla kaj Esperanta Etimologio

(Angle kaj Esperante).

Verkita de Charles G. Stuart-Menteth.

„Utila lernilo per atentigi la pnblikon pri multaj
Esp. radikoj en ilia lingvo.“ *Holanda Pioniro*.
„Intereseĝaj tabeloj.“ *Kristana Espero*.

Prezo 10 pencoj (= 4 respond-kuponoj) afrankite.
17, Hart Street, London W C 1.

SPERTA VARTISTINO por maljuna sinjoro tuj serĉata.
— Sinjorino Mühlplfordt, cigarfabriko, Merseburg (Germ.),
Neumarkt 50.

SIGELMARKOJ, INSIGNOJ KTP. Unua Viena eldonejo de
esperantaj propagandaj sigelmorkoj kaj insignoj, Jozefo
Kocoturek, gravuristo, petas konatojn kaj interesojn por
intertritaĝo, ĉar mi jam hejmevenis el rusa militkaptitejo.
Wien X/5, Arthaber-Platz 2-14. Postulu specimenaron
kontraŭ unu respond-kupono.

Rozoleo bulgara

unuakvalita, por 20 000 bulg. levoj
(16 000 mk.) la kilogramon.

Seriozaj aĉetontoj sin turnu al

Iv. Krestanoff,
Karlovo (Roza Valo), Bulgario.